


HUNGARA FERVOJISTA MONDO



Esperanto, Internacia lingvo



: La placo Széchenyi en la urbo Győr

3
----- 58-a jarkolekto
2014



HUNGARA FERVOJISTA MONDO

Revuo de la Fervojista Esperanto-Movado
en Hungario

Fondita de D-ro István Bácskai en la jaro 1957.

.....
Respondeca redaktoro:

István Gulyás

Eldonas:

Hungara Fervojista Esperanto-Asocio

Hungara Sekcio

de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio

Poŝta adreso: HU-1155 Budapest

Rákos út 98. I/9.

Aperas kvaronjare

Abonprezo: al hungara adreso: HUF 2000

al eksterlanda adreso: EUR 12

*

MAGYAR VASUTAS VILÁG

A magyar eszperantista vasutasok

központi lapja

Felelős szerkesztő: Gulyás István

Kiadásért felelős

A Magyar Vasutas Eszperantó Egyesület

„Szkenguru” Nyomda Budapest

Felelős vezető: Balla László

.....
ISSN 0230-323x
.....

ENHAVTABELO:

42. I. Gulyás: La temo de la membro-nombro estas eterna
43. I. Gulyás: La 46-a Landa Amika E. Renkontiĝo
46. J. Patay: Fervoja katastrofo
47. I. Gulyás: 13+1 demandoj
(D-ro József Halász)
53. J. Patay: Talentaj hungaroj
54. J. Patay: La stacio Vác renoviĝis
55. J. Patay: Antaŭ 75 jaroj mortis
János Csonka
56. J. Patay: Fakaj informoj
58. J. Patay: Spiritaj desertoj
59. J. Patay: Alta distingo de MÁV
59. J. Patay: Regionaj fervojoj

58-a jaro N-ro 3. JULIO-SEPTEMBRO

La temo de la membro-nombro estas eterna

En la pasinta numero de HFM mi provis analizi la nunan situacion sur la tereno de la membro-nombro. Ekde tiam en Hungario okazis la Landa Amika Fervojista Esperanto-Renkontiĝo, en kiu partoprenis la kutimaj nombroj de la partoprenantoj. Dum la Renkontiĝo ni multe parolis pri la kaŭzoj de la malkresko de la nombro de la partoprenantoj en la IFEF-kongresoj, de la membro-nombro de la landaj asocioj, eĉ pri la malaltiĝo de la nombro mem de la landaj asocioj.

Kiel vicprezidanto de IFEF mi multe analizis la malpliigon de la IFEF-membraro en la lastaj pli ol dudek jaroj laŭ la jarraportoj de la landaj asocioj, kaj kompreneble mi trovis multajn gravajn kaŭzojn pri tio. Tiuj kaŭzoj kaj tendencoj estas similaj en Hungario.

La plej grava kaŭzo de la kontinua malkresko estas, ke grave maljuniĝas la fervojista Esperanto-movado, kion montras la proporcio de la emerituloj de la fervojistaj esperantistoj preskaŭ en ĉiuj landaj asocioj de IFEF, kiu proksimiĝas al la cent procentoj. La alia kaŭzo estas, ke malboniĝas la ekonomia situacio ĉefe en Eŭropo, kaj en pluraj landoj la politika atmosfero ne favoras al la Esperanto-agado, pro tio la ĉefa zorgo estas vivteni la asociojn. Estas grava problemo, ke ĝenerale mankas la gejunuloj en la movada laboro, pro tio neniu volas transpreni la gvidan taskon en la asocioj. La tendenco estas preferi la anglan lingvon, do oni tre malfacile povas konvinki homojn pri la neceso de Esperanto. Ĉe ni fervojistoj ankaŭ estas grava problemo, ke rapide ŝanĝis la fervojaj organizoj, kaj malkreskas la nombro de fervojistoj. En multaj landoj stagnas, eĉ ĉesis la movada laboro. Post la ĉeso de la brita, finnlanda, nederlanda, svisa, sveda, estona kaj slovaka landaj asocioj de IFEF, la trista realaĵo montras la atendeblajn ĉeson de la landaj asocioj en Norvegio, Serbio kaj Aŭstrio, kaj havas gravajn malfacilaĵojn Danio, Pollando, eĉ Hispanio. Tiun tendencon tute ne egaligas la nova landa asocio en Kubo.

Do la estonto ne estas tro rozkolora. Mi esperas, ke helpos al ni la nova Strategia Laborplano de IFEF, kaj la entuziasma fervojista komunumo, pro tio la malpliigo de la membro-nombro de la landaj asocioj haltos.

István Gulyás

LA 46-A LANDA AMIKA FERVOJISTA ESPERANTO-RENKONTIĜO

Inter la 11-a kaj 13-a de julio 2014 en la belega urbo Győr okazis la 46-a Landa Amika Fervojista Esperanto-Renkontiĝo. Antaŭ sep jaroj okazis ĉi tie la 39-a Renkontiĝo, kiu estis memorinda pro la 50-a datreveno de la fondiĝo de nia Asocio. Ambaŭ renkontiĝojn organizis eminente kaj profesie la Fakgrupo Győr.



Kelkaj partoprenantoj en la urborigardo

La ĉi-jaran renkontiĝon partoprenis 70 personoj, inter ili unu gasto el Aŭstrio. Győr estas la „urbo de tri riveroj”, „urbo de renkontiĝoj”, situanta en milda medio, patina kaj multkolora urbo, kie de pluraj jarcentoj estas la natura ekonomia kaj trafika centro de la norda Transdanubio ĉe la kunfluo de Danubo, Rábca kaj Rába. Krome ĝi estas kultura centro kun nacia teatro, operensemblo kaj la mondfama „baleto de Győr”. La nombro de la loĝantaro proksimas al 130 mil.

La urbo emerĝas kvazaŭ insulo el la ĉirkaŭaj, iam marĉaj, akvecaj regionoj, kiu logike destinis la urbon esti trafika nodo inter Budapeŝto kaj Vieno. Al ok direktoj disradias el ĝi landaj kaj internaciaj ĉefvojoj, trairas ĝin la internaciaj fervojaj ĉeflinioj Budapeŝto-Wieno, Budapeŝto-Bratislavo. Ĉi tie debranĉiĝas la ĉeflinioj al Sopron-Ebenfurt, al Szombathely kaj al

Celldömölk, krome la flanklinio al Veszprém. Gravaj estas la akvaj vojoj, kiuj de 1992 kunligas la urbon tra la kanalo Rejno-Majno kun la maro.

La fiŝo-, nutro- kaj rifuĝdonaj riveroj kaj interakvaj altaĵoj allogis por loĝiĝo jam en la antikveco. Daŭraj setlejoj establiĝis unuafoje en la bronzepoko. Ĉirkaŭ en 500 a.K. konstruis ĉi tie loĝlokon iliroj, kaj 300 jarojn poste keltoj, kiuj donis la nomon Arrabona (loĝloko ĉe Rába) al sia sidejo ĉe la rivero Arrabo (Rába). La nomon konservis ankaŭ la romianoj, konstruitaj sian fortikaĵon kaj sub ĝi sian civilan urbon sur la monteto Káptalan. Post hunoj, gotoj, longobardoj, avaroj loĝis daŭre kaj refortikigis defendajn instalaĵojn de la romianoj. Kontraŭ ilia fortikaĵo persone gvidis sian armeon la franka imperiestro Karolo la Granda. La unua hungara reĝo Stefano la Sankta ekkonis la strategian signifon de la loko, kaj ĉi tie fondis multajn regionajn administraciajn centrojn kaj episkopejojn. Stefano la 5-a venkis en 1271 ĉe Győr la ĉeĥan reĝon Otokaro, kaj danke pro la subteno fare de la urbanoj li donis al Győr la privilegion de libera urbo. En 1529 la urbo estis bruligita, por ne esti okupita de



La placo Széchenyi kun la Benediktana preĝejo

turkoj marŝantaj kontraŭ Vieno, pro kio ĉi lastaj nomis ĝin „Yanikkale” (bruligita urbo). Inter 1537-1575 ĝi estis refortikigita, plivastigita kaj provizita per remparoj laŭ la

plej modernaj italaj konstruaj principoj, kaj fariĝis la plej fortika loko de la lando. Post incendio plaginta la tutan urbon en 1566, ĝi rekonstruiĝis kun stratoj geometrie



Dancemuloj sur la pargeto

rektangulaj kaj paralelaj, kio bone vidiĝas ankaŭ hodiaŭ en la urbokerno. En 1594 la turkoj okupis la fortikaĵon, sed kvar jarojn poste grafo Pálffy kaj Schwarzenberg rekonkeris ĝin. En 1808 Napoleono enmarŝis la urbon, kaj propramane markis la detruendajn bastionojn. En la 18-a jarcento la urbo riĉiĝis kiel renkomerca nodo, kaj fine de la 19-a jarcento disvolviĝis en ĝi grava industria evoluo kun konstruado de maŝinoj, strataj kaj fervojaj veturiloj, ledprilaboro, teksaĵa kaj nutraĵindustrioj (Raba, Graab – la nuna Graboplast -, Richards, Koestlin). La urbo fariĝis la tria plej granda industria konglomeraĵo de Hungario. Kvankam post la falo de la komunisma reĝimo multaj tradiciaj industrioj ĉesis, estis establita industria parko, kie unu post alia elkreskis per verda investo la plej diversaj fabrikoj kaj uzinoj (Audi, Philips, MAN, Nissan, Renault, Igm, Austro-therm ktp). Ŭ la industriiĝo la interna urbo konservis sian antikvecan arkitektan etoson. Tion montras la Kapitula monteto kun la preskaŭ miljara Baziliko, la Episkopa turo kaj palacoj starantaj sur romiaj fundamentoj kaj ĉirkaŭitaj de la restaĵoj de la

mezepokaj kaj renesancaj defendmuregoj, bastionoj. En la sub-preĝeja kripto de la Baziliko ripozas unu el la unuaj esperantistoj de Győr, lingvisto, politikisto kaj papa prelado Sándor Gisswein. En la sude alkonstruita gotika kapelo troviĝas la admirinda kaprelivujo de reĝo Sankta Ladislao, mondfama majstraĵo de la mezepoka cizelarto. De sur la proksima bastiono „Sforza” malfermiĝas unika panoramo en norda direkto al la kunfluo de la du Rába-branĉoj kun la insulo „Radó” kaj „Mosoni-Duna”. En la bastiono mem, en ties kazematoj estas lokigitaj romia kaj mezepoka ŝtonartaĵoj kaj gravuraĵoj de historiaj urbobildoj. Ĉi tie videblas memorekspozicio kaj spektaklo pri la martira episkopo Vilmos Apor mortigita de sovetaĵ soldatoj, ĉar li defendis virinojn fuĝintajn en la kelon de la episkopa palaco. Se oni turnas sin aliflanken de sur la monteto Káptalan, oni vidas sternaĵojn sube la „forumon” de la malnova burĝa urbo, kiun oni nun nomas placo Széchenyi, unu el la plej belaj barokaj placoj de la lando, kun pitoreskaj burĝaj kaj nobelaj palacetoj, kaj dutura Benediktana preĝejo kaj monaĥejo, kiuj konstruiĝis inter 1634-1641 laŭ la planoj de Baccio del Bianco. La interna urbo estas sistemece rekonstruita. Ties rezultoj kaj la panoramo de sur la multaj pontoj kaj promenado riverborde kaj sur la insulo Radó kaptas la



Martin Stuppnig el Aŭstrio alparolas en la kunsido

koron per sia unikeco. La mallarĝaj stratoj, internaj arkadaj kortoj, ĉizitaj nobelblazonoj super stonframaj pordegoj, pendoŝildoj de metiistoj, tipe angulbalkonoj, kaj ne laste la bunta tumulto de la bazara



La fama kaprelikvujo de Sankta Ladislao

placo rekondukas nin en la etoson de antaŭjarcentaj tempoj.

Kvazaŭ garde staras super la urbo la 58 m-jn alta turo de la urbodomo proksime al la stacidomo. La novbaroka urba palaco estis konstruita inter 1896 kaj 1898 laŭ la plano de Jenő Hübner, kaj fariĝis, apud la turkopela kupra koko, la simbolo de la urbo. Ne pre vizitindas ankoraŭ la Karmelana preĝejo apud la duobla ponto super Rába, ĉe la iama Viena pordego de la fortikaĵo. Ni mencias ankoraŭ la iaman sinagogon, konstruita inter 1868-1870, *kiun oni uzas por kulturaj aranĝaĵoj*, la palacon Zichy, kiu funkcias kiel familia instituto, la urban artan muzeon, la kolektaĵojn Radnai kaj Váczy, la ekspoziciojn Miklós Borsos kaj Margit Kovács. En la diocezaj trezoro, biblioteko kaj ŝtonkolektaĵo troveblas juvelistaj majstraĵoj, liturgiaj trezorejoj, kodeksoj, antikvaj hungaraj libroj kaj mezepokaj ŝtonoj kaj ŝtonpostrestaĵoj.

Do la urbo Győr estas unu el la plej belaj kaj famaj urboj de Eŭropo, ĝi estas perlo de

Hungario.

Por la renkontiĝo donis lokon la Kolegio „Hegedüs Gyula”, kie loĝis granda parto de la partoprenantoj, kaj la restoracio „Bridge” kie okazis la programoj kaj manĝadoj.

La unua programero de la Renkontiĝo estis promenado en la interna urbo kun esperanta ĉiĉeronado fare de Jozefo Horváth. Bedaŭrinde la subite kaj forte alveninta pluvego interrompis la promenadon.

Sabate post la matenmanĝo okazis interesa vizito al la Kapitula monteto, kie la partoprenantoj rigardis la episkopan kastelon, la bazilikan muzeon, kaj en la gotika kapelo de la baziliko ni admiris la kaprelikvuojn de reĝo Sankta Ladislao. Ankaŭ en tiu kapelo estas la sarkofago de la martira episkopo Vilmos Apor.

Post la tagmanĝo la partoprenantoj faris urborigardon per urba trajneto. La trajneto trafikis en la malnova urboparto, kaj pri la vidindaĵoj, ĉefe la interesaj konstruaĵoj, profesia ĉiĉerono donis klarigadon. Tuj post la trajnetveturado ni faris ŝipan promenadon sur la Mosoni-Duna kaj Rába. Ankaŭ estis interesa travivaĵo vidi multajn kajakojn kaj kenuojn kun akvaj sportistoj, kaj en la sunbrila vetero la pontojn, insulojn kajakvobordajn konstruaĵojn.

Vespere okazis festa vespermanĝo, kaj poste balo kun muziko kaj tombolo. La muziko estis



Alia parto de la partoprenantoj de la kunsido

taŭga por danci, kaj en la kadro de la tombolo la organizantoj certigis verajn valorajn – entute 32 – donacojn. Multaj dancemuloj kaptas la okazon por gaje danci.



Partoprenantoj de la ŝipveturado

Dimanĉe matene okazis sankta meso, kaj poste orgenkonzerto en la katolika preĝejo. Bedaŭrinde por la „laborkunsido” restis nur unu horo, en kiu partoprenis nur dek personoj. La prezidanto de la Hungara Fervojista Esperanto-Asocio mallonge parolis pri la 66-a IFEF-kongreso, okazinta en majo en la itala urbo San Benedetto del Tronto. La plej gravaj temoj estis la du kongresproponoj por modifi la minimuman membronombro de la landaj asocioj, kaj

ankoraŭ moviĝanta trajno. La pasaĝeroj ĉiuj saviĝis, la lokomotivestro kun la malpliigi la nombron de la estraro de IFEF. La alia grava temo estis la nova Strategia Laborplano de IFEF por establi ses laborgrupojn por helpi la laboron de la estraro, kaj plibonigi la agadon de IFEF. Okazis kelkaj alparoloj, kiuj kompletigis la temojn. Fine la membroasocio de Tata anoncis, ke la sekvan 47-an Renkontiĝon ili planas organizi atendeble en la urbo Esztergom.

Parolante kun multaj partoprenantoj de la Renkontiĝo, ili konstatis, ke la Renkontiĝo sukcesis bonege, kaj ĉiuj sentis sin bone. Pro tio ankaŭ ĉi tie mi dankas al la membroj de la Fakgrupo Győr la entuziasman kaj profesion organizan laboron. Aparte mi dankas la kunlaboradon de la geedzaj paroj Ferenczy kaj Horváth, kiuj estis ĉiuhore je la dispono de ĉiuj partoprenantoj. Mi esperas, ke la venontaj Landaj Amikaj Fervojistaj E-Renkontiĝoj sukcesos same. Do ĝis revido en la jaro 2015 en la urbo Esztergom dum la 47-a Renkontiĝo.

István Gulyás

FERVOJA KATASTROFO ĈE BALATONO

La heroa lokomotivestro savis la pasaĝerojn ĉe la monto-defalo de Balatonkenese en la jaro 1910. La fervojo rekompencis lin kun malalt-suma premio. Oni oficiale konstatis, ke la instinkto-regado de la lokomotivestro Tibor Balog savis la vivon de ĉiu pasaĝero, kiam la monto-defalo disŝiris la trakon kaj rompis la ĵus tie veturantan trajnon. La lokomotivestro jam anticipe vidis, ke la tuta montodeklivo kune kun la arboj glitas malsupren, abrupte li bremsis kaj malrapidigis la trajnon, tiel la pasaĝeroj ĉiuj senescepte povis desalti el la

vicmaŝinisto saltis dum la lasta momento. Tuj poste la lokomotivo kun багаĵvagono kaj instinkto-regado de la lokomotivestro Tibor Balog savis la vivon de 180 pasaĝeroj kaj la pliaj vagonoj.

La savitaj pasaĝeroj ĉiuj surloke dankis sian vivon al la brava fervojisto, al la fervoja negoc-administracio. La negoc-estraro sendis sian rekonon kaj 80 kronojn da premio al Tibor Balog, kiu savis multajn milionojn de la ŝtataferoj, kaj la vivon de 180 homoj.

Kompilis: **János Patay**

13 + 1 DEMANDOJ

(D-ro József Halász)

Jam la 15-a intervjuo okazas en la kadro de la intervjuo-serio laŭ la titolo „13+1 demandoj”. D-ro József Halász estas eminenta kaj multflanka fervojista inĝeniero kaj esperantisto. Mi pensas, ke li laŭmerite estas en la vico de tiuj esperantistoj, kun kiuj mi faris intervjuon. Jen miaj demandoj kaj la respondoj:

1.) La kutima unua demando: Kiel kaj kiam vi ekkonis Esperanton?



Tio okazis antaŭlonge, kaj en du fazoj. En 1961 mi estis studento en Budapeŝto kaj mi loĝis en student-hejmo. En la najbara ĉambro loĝis mia kolego József Szabó, kiu estis esperantisto, kaj apartenis al la fervojistaj esperantistoj. Tiutempe oni organizis la 14-an IFEF kongreson, kiu ekde tiam estas nomita kiel „Ora Kongreso”. Entuziasme li rakontis pri la projektitaj programoj, pri tiu senpaga vojaĝbileto, donacita de Hungaraj Ŝtatejoj por ĉiu kongresano, kiu estis valida dum unu monato sur la tuta reto de la hungaraj fervojoj por unua klaso. Li parolis pri tio ke lingvo Esperanto estas simpla, logika facile ellernebla, kaj proponis ni organizu lingvokurson en la studenthejmo. Kiam la kurso komenciĝis, partoprenis ĝin 12 personoj inter ili ankaŭ mi. Nia instruisto estis Simon Csóra. Li alvenis ĉiam kun plena saketo, kiu enhavis la instruhelpilojn. Tre sugestive li instruis, nun mi jam scias li uzis la Cseh-metodon. Ĉiun fojon li donis por ni hejmtaskon, kies pretigadon okaze de la sekva studhorro li severe kontrolis. Post iom da tempo aperis la problemo, ĉar la nombro de la kursanoj malpliĝis. Fine sole mi restis. Tiam Simon Csóra diris al mi, mi pardonu, mi povas kompreni lin, ĉu ne? Pro sole mi li ne venos instrui. Tiel la kurso finiĝis. Mi konservis mian lernolibron, Fojfoje mi prenis kaj foliumis ĝin. Ĉi tio estis la unua fazo por mi ekkoni Esperanton.

Jam mi laboris kiel juna inĝeniero ĉe la Konstrua Servo de Hungaraj Ŝtatejoj en Miskolc kiam en 1968 mi legis afiŝon laŭ kiu oni organizas Esperanto-kurson en la laborista hotelo. Mi ekmemoris, kiel studento jam mi renkontiĝis kun ĉi tiu lingvo. Mi anoncis min al la kurso. Kvankam kiel la tempo pasis la nombro de la partoprenantoj

ankaŭ ĉi tie malpliĝis, sed ĉi tiu kurso ne ĉesis. La instruisto de la kurso estis István Temesi. Li estis entuziasma esperantisto, kiu ne nur instruis la lingvon, sed li parolis pri la eblecoj de la lingvouzo, eĉ pri la Esperanto-movado. En 1970 laŭ baza nivelo sukcese mi ekzameniĝis pri lingvo Esperanto. Per tio finiĝis la dua fazo.

(Inter parentezoj mi mencias, mia konatiĝo kun Esperanto daŭris, en 1975 mi akiris mezgradan diplomon, kaj en 1977 la supergradan diplomon, kiu kvalifikis min instrui la internacian lingvon. Por ĉi lasta diplomo mi devis fari disertacion, kies titolo estis „Traceado de kurbaj trakoj”. En 1985 mi sukcese ekzameniĝis kaj ricevis supergradan ŝtatan diplomon kompletigitan per fervoja materialo, pri lingvo Esperanto).

2.) Kiel vi komencis agadi en la Esperanto-movado?

Laŭ instigo kaj instrukcioj de nia kursgvidanto István Temesi, la kursanoj decidis fondi Esperanto-grupon. Nia grupo



Miskolca grupo en la 59-a IFK en Parizo

kreiĝis la 28-an de januaro 1969 en la fervojista kulturdomo en Miskolc. Por la funkciado de la nova grupo la fervojista kulturdomo donis hejmon, tiel la grupo elektis sia nomo la nomon de nia hejmdonanto „Vörösmarty”. Ankaŭ mi estis fondinta membro de la grupo kaj tiam mi renkontiĝis kun la Esperanto-movado. En urbo Miskolc kaj en ĝia ĉirkaŭaĵo tiutempe estis vigla Esperanto vivo. En la urbo funkciis kune kun nia nova grupo tri fervojistaj Esperanto-grupoj. Krom ni aktivis

urbaj grupoj, kaj tre agema Departementa Komitato direktis la movadon sub gvidado Dr-o Lajos Győri Nagy. En niaj kunvenoj preskaŭ ĉiam ĉeestis gastoj el aliaj grupoj. Ankaŭ ni partoprenis la programojn de aliaj grupoj. Post iom da tempo mi estis elektita estrarano de nia grupo, poste mi iĝis sekretario. Kiel delegito mi partoprenis la laborkunsidojn de la Fervojista Fako de HEA kaj tiujn de Hungara Esperanto Asocio. Mi konatiĝis kun la rolantoj de la movado, multaj ekkonis ankaŭ min. Krom la kutimaj movadaj agadoj mi ricevis gravan taskon en nia grupo. Ekde 1970 mi instruis lingvon Esperanto en la kursoj organizitaj de nia grupo.

3.) *Mi bone konas vian eminentan lingvoscion en Esperanto ne nur sur la tereno de fervojo, sed pri multaj aliaj temoj vi povas babiladi eĉ interpreti. Kiamaniere vi akiris tiun larĝskalan scion?*

La demando estas iom flata kaj eble troiga. Vere mi okupiĝas pri aferoj de diversaj terenoj, sed ankaŭ mem la vivo estas multkolora. Kiam mi konatiĝis kun lingvo Esperanto, mi pensis, ke miajn fakajn konojn mi devas priskribi en ĉi tiu lingvo. Komence mi faris tradukojn de mallongaj faktekstoj, poste mi verkis mallongajn artikolojn. Mi tre ĝojis kiam kelkaj el ili aperis en nia fakrevuo, en Hungara Fervojista Mondo. Grava rekono estis por mi, kiam en 1984 nia fakrevuo prezentis mian jam



En amika rondo dum la 46-a IFK en Krems

menciitan skribaĵon, titolitan „Traceado de kurbaj trakoj”. Mi taksis por mi speciala honoro, ke antaŭ la artikolserio skribis rekomendon tiel aŭtoritato, kiel László Boronkay, kiu per serio de siaj fakaj artikoloj donis ekzemplon por ni ĉiuj pri praktika aplikado de nia fervoja terminaro. Ĉi tiu lia tiel, dum la pasinta tempo tiu mia opinio ne ŝanĝiĝis, ke ĉiu esperantisto tiel povas

subteni la aferon de la internacia lingvo, se sur sia faktereno uzas Esperanton. Oni verku raporton, referaĵon pri fakaj eventoj, prezentu la problemojn kaj rezultojn de sia faktereno, kontribuu la esperantlingvajn tradukojn de specialaj fakesprimoj.

Memkompreneble la vivo konsistas ne sole



Renkontiĝo kun malnovaj geamikoj en la 93-a UK

el fakaj aferoj. Okaze de Esperanto-aranĝaĵoj ofte oni devas pretigi skribajn materialojn, kiuj servas la prezenton de la okazejo. Ĉi tiuj skribaj materialoj temas pri geografiaj, historiaj, ekonomiaj demandoj. Sed de tempo al tempo aperas specialaj taskoj, ekzemple prezenti iun vinregionon. Plenumi la taskon, oni devas ekkoni la koncernitajn terenojn, kaj ankaŭ ĉi-okaze estas bezonata traduki specialajn fakesprimojn. En sia komenca agadperiodo nia Esperanto-grupo havis volontan taskon, ni deziris prezenti nian urbon. Ni aĉetis bildkartojn, kiuj prezentis iun urban kuriozaĵon. Por la bildoj ni kompilis kaj tradukis al Esperanto klarigajn tekstojn. Trifoje ni aranĝis memstare Landan Amikan Renkontiĝon, ĉiu okaze ni pretigis informkajerojn, kiuj prezentis urbojn, muzeojn, fortikaĵojn, groton kaj vinkelon. Mi tradukis al Esperanto la prospektojn de Muzeo de Hungara Lingvo, kaj tiun de Prizonmuzeo. Mi pensas, la skalo de la koncernitaj temoj estas sufiĉe larĝa.

4.) *Dum kelkaj jaroj vi estis la gvidanto de la Faka Komisiono de IFEF. Dume vi agadis sukcese kaj la fakaj kaj la terminaraj terenoj. Kial vi forlasis tiun postenon?* Kiam mi estis elektita al ĉi tiu posteno, mi sentis tion honoriga, kaj samtempe premis min la respondeco. Antaŭ mi tiel elstaraj personoj agadis sur ĉi tiu tereno kiel Gernot Ritterspach, aŭ Ludoviko Szekeres, kiuj por mi estis modeloj. La

heredaĵon, ricevitan de ili, mi volis konservi eĉ se eblas evoluigi. En la sekcioj – Terminara Sekcio kaj Fake Aplika Sekcio – mi renkontiĝis kun helpemaj kolegoj, kun kiuj ni povis solvi gravajn taskojn. Niajn klopodojn subtenis ankaŭ la estraro de IFEF, kiu faris gravan decidon, pri subvencio por Esperanto-versio de terminaro de UIC. Ĉiujare aperis la Fervojfakaj Kajeroj. Aperis la dua eldono de CD-ROM disketo de UIC, kiu enhavis ankaŭ la Esperanto-version. La hungaraj fervojistaj esperantistoj pretigis, redaktis kaj eldonis la serion de dulingvaj – Esperanto-nacilingvaj – vortaroj. La serio konsistis el 13 volumoj. Ĉi tiuj estis spektaklaj rezultoj de faka laboro de IFEF, kiuj okazis dum periodo de mia agado, sed ili neniel estas rigardeblaj miaj meritoj. Ili estis rezultoj de nia komuna laboro.

Komuna laboro ne okazas sen diskutoj. En la sekcioj ni longe diskutis pri fakaj demandoj. Mi ne opiniis bona metodo decidi pri fakaj demandoj per voĉdonado. Ofte decidis la diskutojn la voĉo de tiuj personoj, kiuj ne konis la koncernitan fakteron. Tiuspecaj decidoj por mi ne estis akcepteblaj. Antaŭ nelonge mi doktoriĝis pri temo de fervojkonstruado. Tiujn decidojn kiuj kontraŭdiris mian doktorigan rigoran ekzamenon, mi ne kapablis konformigi kun mia scienca konvinko. La senfinaj diskutoj malhelpintus la fakan laboron de IFEF. Tion mi ne volis. Mi opiniis estas iom pli utile, se oni uzas la fortojn por la faka agado anstataŭ senfruktaj diskutoj. La solvon mi trovis per mia foriĝo.

5.) Vi estis estrarano de HEA, vicprezidanto kaj momente kasiso de nia asocio HFEA, dum longaj jaroj gvidanto de la fakgrupo Miskolc, kaj nun la prezidanto de la Miskolca Societo de Fervojistaj Esperantistoj. Kiajn spertojn vi akiris en tiuj postenoj?

En la gvidaj organizaĵoj de HEA mi havis iun funkcion inter 1981 – 2005. Mi estis membro de la komitato kaj tiu de la estraro, eĉ mi estis vicprezidanto. Dum periodo de mia agado okazis la reĝimŝanĝo en nia lando, kiu kaŭzis gravajn ŝanĝojn en la vivo de nia Asocio. Antaŭ la reĝimŝanĝo HEA estis unusola organizaĵo de hungaraj esperantistoj, kiu havis dungitojn, oficejojn, presejon, librovendejon. Ĝi eldonis altnivelan esperantlingvan revuon, titolitan Hungara Vivo. Al la Asocio apartenis

Departementaj Komitatoj, kiuj direktis kaj organizis la laboron de la lokaj grupoj. En la estraro de tempo al tempo estis eksministroj, eksambasadoroj. Tiutempe HEA estis granda landa organizaĵo kiu havis prestiĝon en la socio. Ene de tiu organizaĵo troviĝis la simpatiantoj de diversaj politikaj tendencoj, kiuj klopodis enigi siajn reprezentantojn en la estraron. Okaze de la estrarelektadoj ĉiam estis proponoj krom tiu de la kandidatiga komitato, kaj iom da parto de tiel proponitaj personoj iĝis estraranoj. Inter cirkonstancoj kaj eblecoj de tiu epoko laŭ mia opinio HEA funkciis kiel demokratia organizaĵo.

Post la reĝimŝanĝo ĉesis la monopolo de HEA. Fondiĝis lokaj kaj fakaj Esperanto-societoj, kaj en nia lando funkciis 20-30 Esperanto-organizaĵoj. La plimulto de ĉi tiuj organizaĵoj estiĝis pro ekonomiaj kaŭzoj. Tiom da organizaĵoj estis nekonvenaj aperigi la universalajn interesojn de la



Kun D-ro Imre Ferenczy en la 56-a IFK en Sopron

esperantistoj. Ĉi tiun taskon provis entrepreni HEA, kaj plimulto de la novaj organizaĵoj opiniis grava kunlabori kun HEA. Fondiĝis organizaĵoj, kies celo estis malfortigo de HEA, kaj akiri al si kelkajn taskojn de HEA, ĉefe la reprezentecon de hungaraj esperantistoj ĉe UEA. La ofte akraj diskutoj forprenis la fortojn kaj atenton de la solvo de gravaj problemoj. Krom la sociaj, politikaj ŝanĝoj ankaŭ la dividiĝo de nia landa movado estas kaŭzanto, ke la graveco de Esperanto-movado malpliigis en la socia vivo. La gazetaro ne sciigas pri niaj eventoj, niaj datrevenoj, ni festas inter si, iu parto de la gazetaro iĝis malamikeca, pli-malpli frue ni ne trovos tiun reprezentanton, kiu per sia prestiĝo kapablas defendi la aferon de Esperanto. Nun estas plej granda bezono la unueca agado, sed ties signojn, bedaŭrinde mi ne vidas.

6.) Ĉu eblas plivastigi la uzadon de Esperanto sur la fakaj terenoj? Kiel vi prijuĝas la fakan agadon de UEA?

Por evoluo de nia lingvo la faka apliko estas nemankigebla. Kiam nia lingvo naskiĝis, dum la unua periodo aperis iu prova klopodo pri tio ĉu la internacia lingvo estas taŭga interpreti kaj prezenti literaturajn verkojn. Ĉi tiu demando decidiĝis dum relative mallonga tempo, kaj informitaj personoj nun jam ne diskutas pri tio. La situacio nun estas simila, oni atendas de la esperantistoj pruvi la taŭgecon de Esperanto sur fakterenoj. Kelkaj universitatoj starigas kondiĉojn, akcepti Esperanton kiel fremdan lingvon. Oni preskribas al la studentoj prezenti esperantlingvan fakliteraturon de la koncernita tereno. Ekzistas fakterenoj por kiuj ĉi tiu preskribo ne kaŭzas problemon, ekz. fervojo, konstruado aŭ sanitaro. Ĉe aliaj fakterenoj ne, aŭ ne facile estas troveblaj fakverkoj. Se iu esperantisto volas apogi aferon de nia lingvo, kreu verkojn pri sia faktereno. UEA rekonis la gravecon de la faka aplikado. Iu membro de la estraro estas responsulo pri fakaj aferoj. Ankaŭ la 3,2 punkto de Strategia prioritato okupiĝas pri la temo. UEA povas doni helpon, instigon por la faka agado, sed anstataŭ la esperantistoj ĝi ne kapablas fari la laboron.

7.) Kiel vi vidas la laboron de la fervojistaj esperantistoj en la perspektivo? Ĉu la klopodo de la nuna estraro de IFEF – modifi la statuton kaj regularon por reorganizi la ĉesigitajn landajn asociojn, establi grupojn por solvi la taskojn de la nova Strategia Laborplano ktp - alportos la pozitivan rezulton?

Tio estas malfacila demando. Kian perspektivon havas nun la fervojo? De tempo al tempo responsaj Eŭropaj kaj enlandaj gvidantoj rakontas ke la fervojo havas gravan estonton. Oni prezentas la avantaĝojn de la fervojo (medioprotektanta, energiŝpara, sekura ktp.) tamen ĉu kreskiĝas la transporta povumo de la fervojoj? Ankaŭ en nia lando ni spertis la gravecperdon de la fervojo. La nombro de la fervojistoj malpliĝis de 140 mil al 30 mil. Fervojistaj esperantistoj iĝas el fervojistoj. Memkompreneble la intencoj de la estraro de IFEF estas honorindaj kaj apogindaj. Supozeble la cirkonstancoj en aliaj landoj

estas pli favoraj ol ĉe ni. Certe estas aktivegeblaj tiuj esperantistoj, kiuj pro iu kaŭzo nun ne estas partoprenantoj de la fervojista Esperanto-movado. Mi fidus tion, ke la fortostreĉoj de estraro de IFEF portos bonajn rezultojn.

8.) Kontinue malkreskas la nombro de la esperantistoj en la kadro de UEA, de HEA eĉ de IFEF. Ĉu vi vidas la kaŭzojn? Kiamaniere ni povas haltigi tiun malkreskon, kaj plibonigi la agadon sur ĉiu tereno de la Esperanto-movado?

Oficiale nei la utilecon de Esperanto-lingvo kaj movado ne estas dece. Eĉ kelkfoje internaciaj organizaĵoj mencias Esperanton kun rekono. Ĉi-jare ni rememoras pri Rezolucio de UNESKO, aperinta antaŭ 60 jaroj. Tamen la praktika agado estas alia. La hegemonio de la angla lingvo estas evidenta. En nia lando la instruado de angla lingvo estas deviga. Pli kaj pli estas kondiĉo de



Kun sia nepo en JER en 2010 (Tiszafüred)

dungeblo iom grade koni la anglan lingvon. Kelkfoje oni aplikas ankaŭ iun mildan trudon. Ekz. la Hungara Normafera Korporacio ne tradukigis al hungara lingvo tiun Eŭropan normoserion, nomitan EUROCODE, kiu enhavas la preskribojn de la statika projektado. Oni diris, la tradukado estas multekosta, oni ne havas monon por tiu celo, se la inĝenieroj deziras uzi la normojn, ili lernu la anglan lingvon. Se oni spertas, per helpo de la angla lingvo eblas facile vojaĝi, ĉiu fakliteraturo estas atingebla, por ni estas malfacile argumenti por Esperanto, kaj pliigi la nombron de esperantistoj. Memkompreneble, niajn argumentojn kaj laboron ni povas plibonigi, sed ni devas konstati, ke ni vivas en senamikeca medio,

kaj ni devas serĉi koalicianojn. Niaj naturaj koalicianoj povas esti la defendantoj de la gepatra lingvo. En ĉi tiu batalo, inter la lingvoj la atakoj kontraŭ Esperanto estas antaŭsignoj. Se ĉi tiu procezo daŭros, la atakoj atingos ankaŭ nian gepatran lingvon. En la mondo troviĝas ekzemplo ankaŭ pri tio. En Svedio la supergrada teknika instruado okazas angle. La svedaj fakuloj la teknikajn



Tagmanĝo dum la 58-a IFK en Ĉinio

fakesprimojn jam ne konas svede.

Ni devas ekkoni la agadon de esperantistoj de aliaj landoj, kaj la bonajn metodojn ni devas lerni kaj apliki.

9.) En la urbo Miskolc – kie vi loĝas – estas vigla E-vivo, kiun en la proksima pasinteco la urbaj esperantistoj prezentis en ekspozicio. Ĉu ankaŭ vi partoprenis en tiu akcio kaj laboro?

En urbo Miskolc agadas Esperanto-grupo „Király Lajos” pere de aktiva laboro de geedza paro Pásztor. Ili estas entuziasmaj esperantistoj, kiuj redaktas kaj aperigas retrevuon, titolitan Nordhungaria Informilo. Per retmesaĝoj ili ĉiam informas min pri la aktualaj eventoj, kaj mi kutimas partopreni ilin, florkronadojn, ekspoziciojn, ks.

10.) Laŭ via opinio ni povos organizi IFEF-kongreson en Hungario ankoraŭ en nia vivo?

Mi esperas longe ni vivos. Tamen en la antaŭvidebla periodo laŭ mia opinio ni ne havos realan eblecon organizi IFEF-kongreson en Hungario. Sen helpo de fervojaj organizaĵoj ni ne povas aranĝi kongreson laŭ la pretendata nivelo. Nia fervojo nun vivas sian tre ŝpareman periodon. Mi spertis eĉ tiujn tradiciajn fakaranĝaĵojn, kiujn la fervojo kutimis subteni oni retenas. La nombro de la partoprenantoj estas limigita, la tempodaŭro de la aranĝaĵoj estas mallongigita, kaj unu el tagoj de la aranĝaĵoj laŭeble estu sabato.

Fine mi dubas, ke ni trovus iun gvidanton de nia fervojo kiu simpatias Esperanton.

11.) Vi estas fervoja inĝeniero, eĉ vi doktoriĝis pri faka temo. Mi scias, ke vi instruas kiel pensiulo en faklernejo. Ĉu vi instruis aŭ instruas ankaŭ Esperanton?

Vere, dum lastaj tri jaroj mi instruis en faklernejo, kie oni klerigis teknikistojn por fervojkonstruado. La kurso daŭris dum du jaroj, kaj la studentoj estis akceptitaj kun abiturianta atesto. La historio komenciĝis tiel, oni invitis min en la faklernejon la 30-an de aŭgusto, petante mi instruu kvar studobjektojn, po 28 studhoroj semajne. La lernojaro komenciĝis la 1-an de septembro. Sincere mi konfesas, tiam mi ne pensis pri instruado de Esperanto. La horaro de la kurso estis tre streĉita, bedaŭrinde por instruado de Esperanto mi ne havis eblecon. Tamen kiam mi prezentis min al la studentoj, mi parolis pri Esperanto, kaj pri tio ke mi instruas nian lingvon. El mia instrua agado mi konservas belajn memorojn. Mi estas fiera pri tio, dum tiu periodo dufoje estis aranĝita Landa Faka Studkonkurso kaj ambaŭfoje miaj instruatoj atingis la unuan lokon.

12.) Dum la IFEF-kongresoj – aranĝitaj en Hungario – vi havis iun gravan, plej ofte fakan respondecan postenon de LKK. Kiel prijuĝas tiun agadon?

Mi estas feliĉulo ĉar escepte la 14-an IFEF kongreson, mi havis eblecon partopreni ĉiujn IFEF kongresojn, aranĝitajn en Hungario. En 1982, en Balatonfüred mi estis helpanto, kaj prezentis mallongan prelegeton en kunsido de la Faka Komisiono. Por mi tio estis ekscita evento. Maltrankviligis min la demandoj ĉu la partoprenantoj bone komprenos tiujn fakesprimojn, kiujn mi uzis? Ĉu iu kritikos la elektitan temon? Okazis neniu eksterordinara evento, la partoprenantoj favore akceptis mian prezentadon, kio fortigis mian intencon okupiĝi pri fakaj temoj. En la pluaj Hungarlandaj IFEF kongresoj mi estis ano de LKK: Kun diligentaj kolegoj, mi povas diri kun bonaj amikoj mi kunlaboris. Ni estis bona teamo. En ĉiu okazo ni faris longan antaŭpreparan laboron sub gvidado de István Gulyás, kiu estis konstanta prezidanto de LKK-oj. Al ĉiu tasko apartenis responsulo, kaj limdato. La kongresanoj ĉiam estis kontentaj, ni ne ricevis kritikojn. En 1995 en Pécs kaj en 2000 en Budapeŝto mi prezentis fakprelegojn, kompletigitajn per filmoj. La partoprenantoj povis hejmenporti la presitajn versiojn de la fakprelegoj. Mi klopodis prezenti la aktualajn situaciojn kaj planojn de nia fervojo. Por mi

kaŭzis ĝojon, ke miaj ne esperantistaj kolegoj kiel helpemaj estis komplezaj kolekti la bezonatajn indikojn kaj pretigi la filmojn. Mi rimarkas kiel interesaĵon, la filmo estis prezentita en Budapeŝto, kiu temis pri traknivelaĵoj trapasejoj, vekis intersiĝon de fakuloj. Kvankam la filmo havis esperantlingvan voĉon, oni petis mian konsenton fari hungarlingvan superskribon sur la filmon, kaj poste ĝi estis prezentita en faka konferenco. Estas agrabla memoro la tuttaga ekskurso en Eger en 2000. Galanta donaco de la tiama gvidanto de Hungaraj Ŝtatejoj estis tiu speciala trajno, per kiu la partoprenantoj povis vojaĝi inter Budapeŝto kaj Eger. Multe da helpo ni ricevis de niaj esperantistaj amikoj vivantaj en Eger fari interesan programon. La kongresanoj fartis bone, kaj preskaŭ ne volis forlasi la finpunkton de la ekskurso. Tio estis gastejo ĉe vico de vinkeloj en „Szépasszony völgy” (Valo de bela virino) Estas agrabla sento por mi, ke la fervojistoj ne sole en Hungario ŝatas la bonan vinon.

En 2004 okazis speciala kongreso en Sopron, kiun aranĝis du landaj sekcioj de IFEF. Sukcese ni povis kunlabori kun niaj aŭstraj kolegoj. La celoj de la kongresaj ekskursoj troviĝis sur tereno kaj de Hungario kaj de Aŭstrio. Ne estas tro ofta afero, ke IFEF kongreso havas internacian LKK-n.

13.) Mi scias, ke kiam via nepo estis juna knabo, vi emis nur per E. paroli kun li. Kiel toleras vian Esperanto-agadon via familio, ĉefe via edzino kaj nepo?

En ĉiu normala familio troviĝas opoziciulo, sed ĉi-okaze ne estis serioza kontraŭstaro. Feliĉe miaj familianoj ĉiam estis toleremaj kaj helpemaj al mia esperantista agado. Mia filino tuj konsentis pri tio, ke mi ne parolos hungare kun mia nepo. Tio okazis antaŭ 17 jaroj, kaj ankaŭ nun mi kaj mia nepo nur Esperante parolas unu kun la alia. Kiam mia nepo estis du kaj duon jara, li demandis de sia patrino, ĉu vi scias ke mia avo parolas ankaŭ hungare? Estis mallonga periodo, kiam li vizitis infanĝardenon, antaŭ siaj amikoj li hontis ke ni uzas fremdan lingvon. Kiam li estis lernanto, en la lernejo, antaŭ siaj samklasanoj la instruistino laŭdis lin, pro lia lingvoscio. Ekde tiu momento estas kutima afero nia lingvouzado. Mi kutimas diri al li, ĉiu homo havas gepatran lingvon, sed vi havas ankaŭ avan lingvon. Ni faris regulon, unu kun la alia ni parolas Esperante, tamen se ni ĉeestas plurope, ĉefe se ne familianoj troviĝas inter ni, mia nepo devas traduki al hungara pri

kiu ni parolas Esperante. Antaŭ kelkaj jaroj mi instruis al mia nepo matematikon kaj statikon



Dum la Landa Amika Renkontiĝo kun la familianoj en Hódmezővásárhely en 2011

dum la somera feriado. Mia filino diris pri mia nepo, li vere estas amasiĝite malavantaĝulo lerni matematikon kaj statikon Esperante dum feriado. Mi pensas, almenaŭ esperas, ke ĉi tiu situacio grave helpis mian nepon lerni aliajn fremdajn lingvojn. Ĉi-jare li sukcese ekzameniĝis supergrade pri angla lingvo.

13+1.) La kutima lasta demando: Kiu estas viaj planoj por la estonta agado por Esperanto?

Mi havas komencitajn kaj interrompitajn taskojn, kiujn mi deziras fini. Mi komencis verki kajerojn pri la fervoja surkonstruaĵo. Unu el ili estas pretigita, ĝia titolo estas „La balasto”. La dua estas en duonpreta stato, sed pro mia okupiĝo ĝis nun mi ne povis fini ĝin. Ĝia titolo estas „Ŝpaloj”. Se mi havos tempon kaj forton mi intencas daŭrigi la serion per temoj de reloj kaj trakforkoj.

Nia Esperanto-grupo en Miskolc ekzistas ekde 45 jaroj. Mi kolektas la dokumentojn, fotojn, kaj aliajn materialojn. Mi komencis verki la historion de nia grupo. Mi esperas, la verko sukcese pretiĝos. Dank’ al Dio, mi ne enuas.

Komentario: *Mi havis veron, kiam mi invitis D-ron József Halász por intervjui. El liaj respondoj desegniĝas kaj montriĝas liaj veraj karaktero, sindonemo kaj inciteto al Esperanto. Delonge mi konas lin, kiu ĉiam estas preta helpi kaj kunagadi por ni. Mi multfoje partoprenis kune kun li en IFEF-kongresoj kaj aliaj renkontiĝoj. Ni havas multajn, belegajn travivaĵojn, kiujn mi esperas, ke ankaŭ li memoros en nia vivo. Mi deziras al li longan kaj ageman vivon en bona sanstato kaj sen enuo.*

István Gulyás

TALENTAJ HUNGAROJ

(Hungaraj inventistoj, aŭ ekstrema tago de hungara fierulo)

De jardekoj eksterlande vivanta hungaro spektaklis interesan reklamfilmon pri Hungario, kaj li decidis, ke hodiaŭ uzas nur tiajn aĵojn, pri kiuj la homaro povas danki al la hungaraj inventistoj.

Unue li prenis globkrajonon (inventis László Bíró, 1931), skribis sur papero: „Inventemaj Hungaroj”, poste fiksas tion sur la pordo de fridujo (inventis Leo Szilárd, 1929). Poste per alumeto (inventis János Irinyi, 1836) ekbruligis cigaredon, dume aŭskultis



Ányos Jedlik

kompakt-diskon (CD) kaj rigardadis ĝian holograman matricon (inventis Gábor Dénes, 1947) kaj trinkis tason da teo kun C-vitamo (Albert Szent-Györgyi 1931). Poste per konduktila aparato (Tivadar Puskás, 1878) li telefonis al sia amiko. Krome li havis iom tempon, pro tio per komputero (János



Albert Szent-Györgyi

Neumann, 1944) li skribis leteron al la urba konsilio, sed antaŭe li meditis kiun sistemon uzi, fine li elektis 'Basic' (János Kemény, 1964), poste li aranĝis siajn fendaĵojn je „exceltabulo” (Károly Simonyi, 1974). Li decidis spektakli 3D-an filmon, sed li forgesis tiajn specialajn okulvitrojn (Dániel Rátai, 2010) en sia laborejo. Pro tio li preferis bakelitan diskon funkcia per tradicia gramafono (Károly Goldmark, 1948), dume li ekŝaltis ankaŭ la televidaparaton (Dénes Mihály, 1919). Li vidis, ke oni ĵus prezentas Nev-Jorkon, li ekĝojis, ke li havas koloran aparaton (Károly Goldmark, 1948). La



Ernő Rubik

urbo tre plaĉis al li, unuavice la Centra Parko (Sándor Asbóth planis la rektifikan planon de la urbo). Post la filmo sekvis sciencpopulariga prelego pri la kosmo-esplorado kaj admiris la lun-aŭton (Ferenc Pávlics, 1960); poste antaŭ

la ekiro li provis solvi la Rubik kubon (Ernő Rubik, 1976).

Poste li ekiris, kaj rigardadis la montro-fenestron de aŭtomagazeno, ja li deziris aĉeti aŭton. Li enpaŝis la vendejon kaj prenis sian aŭtomatan fotoaparaton (József Mihályi, 1938), iom li meditis, ĉu li uzu la malnov-tipan kontaktlenson (József Dallos, 1928), aŭ mol-materialan kontaktlenson (István Györffy, 1959). Ekplaĉis al li la Ford T-modelo (József Galamb, 1908), poste li ekvidis dizelmotoran BMW (Ferenc Ansits, 1983), eĉ li rigardadis Chevrolet-on, kio havis aŭtomatan




János Neumann



Oszkár Asbóth

rapidum-ŝanĝilon (László Bíró, 1932). Fine kaptis lian atenton la special-forma Volkswagen (Béla Barényi, 1925). Tiu ĉi tiom plaĉis al li, ke ankaŭ ĝian karburilon (János Csonka, 1893) li fotis. Venis en lian cerbon, ke grava estas por si la biciklo, pro tio li konservis ĝin en la kelo, kaj kontrolis ĝian dinamon (Ányos Jedlik, 1861), kaj tra la fenestro li ekvidis la malleviĝantan helikopteron (Oszkár Asbóth, 1928). Tion li rakontis al lia „Pulitzer-premia” (József Pulitzer, 1917) ĵurnalista amiko, kiun li renkontis en muzeo, kie ĵus oni prezentis la fazojn de la invento de lumtralasiva vitrobetono (Áron Losonczy 2001). Vespere li iris hejmen, jam estis malhele, pro tio li ekŝaltis sian kriton-tipan lampon (Imre Bródy, 1930), trinkis



Zoltán Kodály

glason da sodakvo (Ányos Jedlik, 1940). Dolorigis lin la kapo, prenis unu Kalmopyrin-on (Gedeon Richter, 1912), aĉetite en Vieno. Post tuttaga penado li retiris la bakelit-disko kaj aŭskultis la faman komponaĵon „Psalmus Hungaricus” (Zoltán Kodály, 1929) sidante, ripozante en komforta fotelo.

Kompilis: **János Patay**

LA STACIO VÁC RENOVIGIS



Konstruataj peronoj kaj trakoj

La rekonstruita pasaĝerhalo de stacidomo Vác ekfunkciis, kie la tage/nokte funkciantaj ĝiĉetoj servadas ĉ. sep-mil pasaĝerojn po tage. La stacio estas artobjekto. Cetere la plena rekonstru-laboro ankoraŭ daŭras, sed la rekonstruita halo estas je la dispono de la pasaĝeroj. Dum kulmina tempo oni povas aĉeti vojaĝbiletojn ĉe tri gicetoj, eĉ ĉe ĉiuj kasoj eblas pagi per bankokarto. La ĝiĉetoj



La fervojaj laboristoj rekonstruas la relojn

funkcias inter la 0-24 horoj, eĉ marde kaj merkrede inter la 8-16 h. oni povas eĉeti internaciajn biletojn. Bilet-aŭtomata maŝino estas establata, ĉe kio oni eblos transpreni biletojn aĉetitajn per rethalo. Krome renoviĝos la publikaj flankaj ejoj, tualetoj de la konstruaĵo. Ekipo de modernaj vizualaj informiloj sekvos la renovigon de la internaĵo, same la rekonstruado de la trafikregadaj ejoj. Okazas eksteraj laboroj, ordigo de la areo de la stacidomo, parkejoj por veturiloj. La ĝiĉeto de la stacidomo en 2013 vendis 691 milojn da vojaĝbileto, la nombro de la pasaĝeroj superis du kaj duon-milionojn. La nuntempa evoluigo tuŝas tri flankajn itinerojn: Budapest-Vácrátót-Vác (linio n-ro 71); Vác-Balassagyarmat (linio n-ro 75) kaj

krom la antaŭurba trafiko la internacian itineron Budapest-Szob (sur linio n-ro 71). Dum la rekonstrua laboro ĝis la jarfino malpli da trajnoj veturas tuŝante la stacion Vác, labortage 130-140 trajnoj haltas en la stacio Vác. Depost la decembra horarŝanĝo atendeble la trajnoj veturos ĝis Vác sur la linioj 71 kaj 75. Nuntempe labortage 135 trajnoj veturas sur la linio n-



La rekonstruita stacidomo

ro 70. Depost la horarŝanĝo sur la linio n-ro 71 ĉ. 50, kaj sur la linio 75 ĉ. 35 trajnoj tuŝas la stacion de Vác. Laŭtempa taktio iras la investado de la Internacia



Trajno en la stacio Vác

Infrastruktura Evoluigo; la rekonstruado – komencita somere de 2013 - estas ĉe duontempo. Dum tiu laboro oni trakonstruas la koncernan relvojdistrickton, la kajoj renoviĝos, oni konstruos altajn kajojn, kiujn oni povas atingi tra modernaj larĝaj subpasejoj. Kvar liftoj kaj rampoj zorgos pri senobstaklaj aliroj. La ĝis nun rekonstruitaj tri trakoj nuntempe prenas al si la entrafikigojn de la trajnoj.

János Patay

ANTAŬ 75 JAROJ MORTIS LA INVENTISTO JÁNOS CSONKA



János Csonka naskiĝis en urbo Szeged la 22-an de januaro 1852, kaj mortis en Budapeŝt la 27-an de oktobro 1939. Li studis en sia naskiĝ-urbo, post siaj

studvojaĝoj li dungiĝis en la Teknika Universitato de Budapeŝt kaj laboris kiel metieja estro ĝis emeritiĝo (1925). Li estis la inventisto de la karburatoro; kaj la ekirigo de la hungara motor- kaj maŝinfabrado. En la forĝista metiejo de lia patro li fariĝis faklaboristo. Plurloke li laboris: en la ĉefriparejo Fervojkompanio Alföld-Fiume de Szeged (1870-1873), MÁV Lokomotivejo de Budapeŝt (1873-1874), poste en Vieno, Zuriko, Parizo kaj Londono. Daŭre li pluper-fektigis sin, kaj akiris la estran postenon de la instrua metiejo de „József Teknika Universitato” (1877-1925). Dume li aŭskultis la universitataj lekcionojn.



La unua aŭtomobilo de János Csonka

András Mechwart petis lin fari funkcikapabla tiujn motorojn, kiujn Ganz ekposedis. Tiam kaj tie li interkonatiĝis kun Donát Bánki. Ĉe jarcentŝango en la Teknika



Universitato ili ambaŭ ricevis novajn taskojn: Donát Bánki fari-ĝis katedr-estro, János Csonka de-vis instalati la novan mekanika-teknologian laboratorion de la universitato. Paralele kun la elstaraj teknikaj kreaĵoj János Csonka akiris nesensvalidigeblajn meritojn pro lia kontinua modernigo de la hungara teknika supergrada instruado. Li havis amikojn inter mondfamaj universitataj profesoroj, kaj inventistoj, ekz. Robert Bosch. Krom la instruado li planis kaj kreis paper- kaj teksaĵ-ŝirmaŝinojn, multajn instru-mentojn, mezur-aparatojn. Lia ŝatata labortereno estis la motor-komponado kaj



veturilpro-jektado. Li preparis motoran triradan ciklon por la Hungara Poŝto kaj ankaŭ specialan aŭton. De tiu tempo oni kalkulas la komencon de fabrado de la hungara poŝto-aŭto. Ĉe la mortorfabrado li aplikis unue la aluminon, la regan suĉvalvon, alttenzian magnet-sparkilon. Li projektis la unuan enlandan kompresoran motoron, la kontraŭfajran motoron, boato-motoron, minejlokomotiv-motoron, relaŭto-motoron, personaŭton kaj aŭtobuson. Post la emeritiĝo li ekfunkciigis aŭto-riparejon en Budapeŝt. El tiu riparejo poste evoluiĝis la „Csonka János Maŝinfabro” kaj la pli posta „Malgranda Motor- kaj Maŝin-fabro”. Pro lia elstara inĝeneria produkto la Inĝeneria Ĉambro en 1924 manifestis lin maŝin-inĝenerio.

János Patay

FAKAJ INFORMOJ

Renoviĝis la porklienta servo de la stacio Budapest-Keleti



La TFT-monitoroj en la stacio Keleti

En la stacio Budapest-Keleti funkcias modernaj TFT-monitoroj (TTS: Text To Speech – teksto por parolo) por informi la pasaĝerojn anstataŭ la malnov-sistemaj tabuloj – eĉ virinsonaj laŭtaj informoj anstataŭ la pli fruaj virsonoj.

MÁV emfaze tenas grava tasko al si la evoluigon de la staciaj aŭtovidaj informo. La celo estas: ĉiukaze la plej baldaŭ infomi la pasaĝerojn prin fidindaj freŝaj informoj. Precizaj kaj tujaj informoj sur modernaj surfacoj

Kunteno por la pura fervojo

Ekde du jaroj ekiris akcio-serio de propravolaj MÁV-dungitoj sub la moto: „Pure por la fervojo”. En la kadro de tiu ĉirkaŭ kvincent dungitoj de la fevojkompanio faris memvolan purigon sur pliaj 71 frekventitaj stacioj. La du semajnojn daŭriĝinta akcio en la regionoj de Balatono, lago Velence, departementaj sidejoj kaj grandaj urboj, ekskurslokoj beligis la fervojajn staciojn per forigo de la malpuraĵoj, sarkis la florbedojn, pentris kaj riparis la difektajn benkojn, staciajn meblojn, faris la bezonatajn bontenadajn laborojn..



La ĝardenistoj de MÁV beligas la stacidomon

Kvin kontenertrajnoj alvenis



Unu el la kontenertrajnoj

La investado de la itinero Budapest-Beograd kontribuus akiri tiun celon, ke Hungario estu la ĉefa tranzitlando por transporti la orientajn varojn al Okcident-Eŭropo. Serbio jam

La rekonstruado de itinero Budapest-Beograd tra Hungario vigligus la sistemajn fervojajn transportojn inter la greka haveno kaj Okcidenta Eŭropo. Antaŭ nelonge jam kvin kontenertrajnoj alvenis al Hungario el la haveno de Pireo. La haveno de Piero plejparte el Ĉinio alvenintajn varojn akceptas kaj sendas plu al Eŭropo. Por evoluigi a taktan transitan transporton al Okcident-Eŭropo, estus bezonata rekonstrui la fervojlinion Budapest-Beograd, pri tio la hungara kabineto emfaze traktas la evoluigan investadon.

modernigis 40 km-ojn longan etapo, do sur 334 km-jn longa etapo oni devas kompletigi je du-traka kaj fari taŭga je 160 km/h. rapidkapabla. Inter la du ĉefurboj per tiu rekonsruo la nuna 7-8 h vojaĝdaŭro reduktiĝus je 3,5 h.

Oni proklamis 130 infanfervojistojn



La proklamiga ceremonio

En la stacio de Infanfervojo de Hűvösvölgy oni proklamis infanfervojistojn. 130 geinfanoj solene votis kaj fariĝis infanfervojistoj. El inter ili eble multaj devigos sin fariĝi profesia fervojisto, ja la akiritaj travivaĵoj ĉe Infanfervojo instigas ilin. Okaze de la solenaĵo oni „baptis” la lokomotivon je nomo Bendeguz – pri eminenta rolanto de la filmo sub la titolo „Ekiras la relvoja gardistejo”. János Fónagy, la ŝtatssekretario de la Ŝtatevoluiga Ministerio salutis la „novbakitajn” infanfervojistojn, kaj Ilona Dávid, MÁV-prezidantino faris la proklamigan ceremonion.

Nomdono al MÁV nostalgia restoracivagono



La "Császár" restoracivagono

En la Okcidenta Stacidomo antaŭ la reĝa atendejo oni solene proklamis la „Császár restoracivagonon” je la nomo „Albert Flórián”, okaze de la ĉi-jara Fervojista Festo. La portreto de la mondfama futbalisto Flórián Albert ornamas la eksteran surfacon de la vagono. La internaĵo de la vagono estas stilo „verda-blanka” kolora. En la vagono oni aranĝis specialan ekspozicion sub la titolo „Moviĝanta Albert-ekspozicio”, kiu per bildoj prezentas la karieron de la eminenta sportisto; la plej valoraj ekspoziciaj relikvoj estas la „Orpilko”, la „Arĝentaj ŝuoj” kaj la „Pokalo de Foirurboj”.

La organizo „MÁV Nosztalgia” pasintjare aĉetis, rekonstruis, kaj modernigis la restoracivagonon. Estonte tiu restoraci-vagono veturos

en la vagonaroj „Gyertyafény Expressz” (Kandellumo Eksprestrajno), „Élményvonat” (Travivaĵ-trajno) kaj „Jewels of Persia” (Trezojoj de Persio) luksaj trajnoj. Post la solenaĵo la „memortrajno” veturis al Veresegyház; inter la invititaj pasaĝeroj troviĝis la Hungara a Elita Taĉmento de Ĵurnalistoj, kaj Elita Taĉmento de Aktoroj kaj futbalistoj de Ferencváros. En Veresegyház la du Taĉmentoj pilkoludis kun la lokaj futbalistoj. La tuttaga programo reduktiĝis sur la sporto kaj rezervis dignan primemoron al la „Cezaro”, flegante la noblajn



La solena rubando-tratranĉado

tradiciojn de la hungara futbalo.

Kompilis: **János Patay**

SPIRITAJ DESERTOJ

MEMORU!!!

En la unua tago de la studjaro nia profesoro prezentis sin, kaj petis prezenti nin al imagita nekonatulo. Mi ekstaris, ĉirkaŭrigardis, dume iu delikate tuŝis mian ŝultron. Mi returniĝis, kaj falta, maljuna sinjorino rigardis sur min ridete, per tio plenradianta la tutan klason. Tiel ŝi ekparolis: „Mia nomo estas Roza, mi estas 87-jaraĝa. Ĉu mi rajtas brakumi vin?” Mi ekridis, kaj entuzisme respondis:

- La plej kompreneble, jes! – Poste ŝi amikece brakumis min.
- Kial vi estas en la altlernejo en via tiel maljuna, naiva aĝo? – mi demandis ŝin. Ŝerceme ŝi respondis:
- Pro tio mi estas ĉi tie, por ke mi trovu al mi riĉan edzon, edziniĝu kaj nasku geinfanojn.
- Sed respondu serioze – mi diris. Mi scivolis, kio motivis ŝin, ke tiom grandan provokon ŝi entreprenu tiom maljune.
- Ĉiam mi sonĝis pri tio, ke mi finu la altlernejon, kaj fine alvenis ĝia ĝusta tempo! – ŝi diris.

Post la studhoroj ni promenis al la konversaciejo kaj konsumis ĉokoladon. Baldaŭ ni interamikiĝis. Dum la sekvaj tri monatoj ĉiutage kune ni iris hejmen kaj multe ni babilis. Ĉiam mi imagis, ke mi partoprenas tempovojaĝon, kiam ŝi rakontas pri la filozofioj de sia vivo. Dum la studjaro Roza fariĝis iu simbolo de la universitato; kun iu ajn ŝi renkontiĝis, baldaŭ ili interamikiĝis. Ŝi ŝatis elegante vestiĝi, kaj amuziĝis, se oni atentis pri ŝi. Post la fino de la semestro ni invitis Roza al la bankedo de futbalo. Neniam mi forgesos, tiam kion ŝi instruis al ni. Oni anoncis ŝin kaj ŝi aperis sur la podio. Dum la komenco de la ekparolo ŝi faligis tri ludkartojn surteren. Iom ŝi estis embarase, kaj kaptante la mikrofonon ŝi diris: Mi petas pardonon, mi estas iom nervoza. Mi rezignis pri la biero

pro la fasto, kaj la viskio detruas min. Neniam mi reordigos tiujn ĉi kartojn. Do, mi diros parkere kion mi scias!

Ni ridis, ŝi raspis sian gorĝon kaj daŭrigis jene:

Ne pro tio ni ĉesigas la ludon, ĉar ni maljuniĝas. Pro tio ni maljuniĝas, ĉar mi ĉesigas la ludon. La juneco, feliĉo kaj sukceso havas entute kvar sekretojn. **Ridu multe kaj ĉiutage trovu humoron en via vivo! Nepre vi devas havi sonĝon! Se vi perdas viajn sonĝojn, vi mortis.** Ni konas tiom multajn homojn, kiuj tiel iradas en la mondo, ke ili estas mortintoj kaj eĉ ili ne scias pri tio! Granda diferenco estas inter la du esprimoj: vi plenkreskas, aŭ vi maljuniĝas. Se vi estas 19-jaraĝa kaj dum la tuta jaro vi kuŝas en la lito sen fari ion utilon, eĉ tiam vi estos 20-jaraĝa. Nuntempe mi estas 87-jara, kaj se mi kuŝas tutan jaron en lito, tiukaze mi estos 88-jara. **Ĉiu povas maljuniĝi, por tio oni ne bezonas talenton kaj kapablecon.** Por ke vi plenkresku, ĉiam vi devas trovi la eblecon en la ŝanĝo. Nenion vi domaĝu! **La plenkreskuloj ĝenerale nenion damaĝas, kion ili faris, ili damaĝas kion ili ne faris.** Nur tiuj timas la morton, kiuj damaĝas tion, ke eĉ ili ne vivis.

En la fino de la studjaro Roza finis la altlernejon, kion jam antaŭ tre longe komencis. Unu semajnon post la transpreno de la diplomo ŝi mortis, pace, dum sia ŝonĝo. Pli ol du-mil studentoj partoprenis la enterigan ceremonion por honori al la mirinda damo, kiu montris tiun ekzemplon: **neniam estas malfrue fariĝi tio, kio vi volis.**

Memoru: maljuniĝi estas devige, plenkreski estas demando de elekto! Tion ni vivas, kion ricevas, tiel ni vivas, kiel ni donas!

Kompilis: **János Patay**

ALTA DISTINGO DE MÁV AL LA DIRIGENTO

KOBAYASHI KEN-ICHIRO

40-jara sukcesplena komuna laboro kun la Simfonia Orkestro de MÁV

Antaŭ 40 jaroj, en 1974 la Simfonia Orkestro de MÁV kun la direkto de Kobayashi Ken-Ichiro gajnis la I-an



Ilona Dávid transdonas la distingon

Internacian Dirigentkonkurson de la Hungara Televizio, kion multnombraj enlandaj kaj eksterlandaj komunaj roloj sekvis. La orkestro havas firman eminentan kontakton kun la dirigento.

Printempe de 2014 Kobayashi Ken-Ichiro kun grandioza koncertserio festis 40-jaran jubileon de la 1974-jara I-a Internacia Dirigentkonkurso de Hungara Televizio. Dum tri semajnoj prezentis sep koncertojn

kunlabore kun la plej eminentaj hungaraj klasikmuzikaj ensembloj.

Honore al la kunlaboro de la dirigento, la Hungaraj Ŝtatformoj donacis la distingon „Vasútert” („Pro Fervojo”) al Kobayashi Ken-Ichiro. Ilona Dávid MÁV prezidantino transdonis la altrangan distingon en la Muzikakademio. Ilona Dávid en sia festparolo emfazis: „Per tiu ĉi honoro ni esprimas nian altestimon pro la agado por la fervojo kaj antaŭenigo de ĝiaj interesoj. En la nomo de Hungaraj Ŝtatformoj mi



La Simfonia Orkestro de MÁV akceptas la aplaŭdon en la fino de la koncerto

dankas la ĝisnunan kunlaboron – mi esperas, ke ankaŭ estonte ni akiros multajn komunajn rezultojn.”

János Patay

Regionaj fervojoj ĉu konkurso kun aŭtostradoj kaj aertrafikoj?

En Balatonfüred la fervojaj generaldirektoj de la „Kvaropo de Visegrád” subskribis interkonsenton pri la efeektivigo de la fervoja trafiko de konkurso kapabla regiono.

Ilona Dávid anoncis, ke la hungara, la slovak, la ĉeĥa kaj la pola fervojoj subskribis kunlaboran interkonsentan intenc-deklaron. En tiu ili esprimis, ke oni provos akordigi la evoligojn de la fervoja strukturo por komune kreskigi la vartransportajn volumojn. Ŝi emfazis, ke ni ĉiuj estas interesataj por efektiviĝi la vartransportajn koridorojn de

norda-suda koridoro. Cetere la interkonsento enhavas la klopodojn koncerne al la pasaĝer-transportoj.

Krom la trafikantaj trajnoj ni deziras oftigi la noktajn veturojn inter la unuopaj landoj. Krome oni ekzamenas kiel oni povus veturigi marriverajn trajnojn, intermitajn, somerajn ekskurs-trajnojn inter la koncernaj landoj.

Ni devas ekzameni, ke kiajn komunajn veturojn eblas veturigi je la intereso por konkursi kun la aŭtostradoj, respektive aertrafikoj de la regiono.

Kompilis: **János Patay**



La membroj de la Fakgrupo Kelebia post la Renkontiĝo



La 67-a kongreso de IFEF okazos de la 16-a ĝis la 23-a de majo 2015 en Ĉinio en la urbo Kunming. Informojn kaj aliĝilojn oni povas ricevi de HFEA.